# EKO 2025

**Informfluo kun influo**

EKO 2025-14. Aprilo 4. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sume 300 KB

## Helpu al junuloj partopreni en la IJK

La Fonduso *Partoprenu IJK-n* de TEJO ĉiujare subtenas finance la partoprenon de junuloj el Azio kaj Oceanio en la Internacia Junulara Kongreso (IJK) por fari la kongreson pli inkluziva kaj tutmonda. Okaze de la 81-a IJK en Indonezio, **TEJO lanĉis donackampanjon por subteni junulojn de Azio kaj Oceanio**, inter la malplej reprezentataj grupoj en niaj kongresoj. La indonezia IJK estos la unua en la regiono post la 68-a IJK en Hanojo (2012). Post tiu IJK ekaktivis movadoj en landoj kiel Indonezio, Filipinoj, Orienta Timoro. Tie abundas junaj samideanoj, kies partopreno en IJK kapabligus kaj instigus ilin al pli aktiva kaj longdaŭra agado en siaj landoj kaj internacie. Elstara ekzemplo estas Arya Bhaskara Ferduzi, la ĉeforganizanto de la IJK, kiun la fonduso subtenis por ĉeesti la 79-an IJK en Italio (2023).

Partoprenantoj de IJK kapabliĝas pri diversaj lertoj kaj interŝanĝas sciojn kaj spertojn pri la movado. Inter la tradiciaj programeroj troviĝas diversaj seminarioj kaj lernigaj kaj kulturaj aranĝoj. kiuj premieris dum la 78-a IJK en Nederlando (2022). Bedaŭrinde, junuloj de Azio kaj Oceanio ofte reprezentas tre malgrandan elcenton de ĉeestantoj:

Aziaj kaj oceaniaj junuloj estu la steluloj de la indonezia IJK. Por atingi ĉi tiun celon, TEJO celas kolekti minimume € 8000 por subteni almenaŭ 20 junulojn el la regiono. En solidareco, UEA, la ĉefa partnero de TEJO en ĉi tiu kampanjo, **donacos al la fonduso eŭron por ĉiu eŭro**, kiun la fonduso ricevos de aliaj donacoj, ĝis maksimume € 2000.

Ni invitas vin donaci ĝirante al la UEA-konto de IJK (**ijkb-b**) indikante "PPIJK + [Via nomo, lando aŭ "Anonima"]". Eblas donaci ankaŭ per karto, banka ĝiro aŭ Paypal (https://ijk2025.tejo.org/kiel-donaci). Kun minimuma donaco de €5 viaj nomo kaj lando aperos en nia listo de subtenantoj, krom se vi donacas anonime. Por scii pli pri nia iniciato, rigardu ĝian ĉefpaĝon aŭ skribu al ijk2025@tejo.org.

La 81-a IJK, kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio, daŭre bonvenigas aliĝojn de homoj el ĉiuj aĝoj, landoj kaj lingvoniveloj. Eblas aliĝi dum la dua aliĝperiodo kontraŭ favoraj prezoj per la reta aliĝilo.

Koncizigita el gazetara komuniko de UEA.

## Du hungaraj tradukoj

Aperis du esperantlingvaj tradukaĵoj de mia edzo, Pásztor László.

***Slovakaj samvilaĝanoj: rakontoj*** **/ Mikszáth Kálmán;** https://mek.oszk.hu/26600/26660

***La du malriĉegaj studentoj: fabela historio por la junularo*** **/ Mikszáth Kálmán;** https://mek.oszk.hu/26600/26661

Adri Pásztor

## Madagaskara kongreso

De la 22-a ĝis la 27-a de februaro  okazis Malagasa Esperanto-Seminario en Antananarivo; ĝin partoprenis 40 plejparte junaj malagasoj kaj du eŭropanoj (el Germanio kaj Litovio). Legu prian artikolon de Ulrich Matthias en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/03/afriko-51/

## Hispana kongreso survojas

Oni jam diskonigis la unuan version de la programo de la 83-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Sorio de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2025.

Ĝenerala prezento: https://kongreso.esperanto.es/la-programo/
Horaro: https://kongreso.esperanto.es/provizora-programo/
Prelegoj https://kongreso.esperanto.es/pesentado-de-prelegoj-kaj-autoroj/
Malferma programo por la publiko: https://kongreso.esperanto.es/senpagaj-programeroj-por-la-generala-publiko/

José Antonio del Barrio, Fundación Esperanto




## Unesko-Kuriero oktobro-decembro 2024

La kvara numero de Unesko-Kuriero por la jaro 2024 estas disponebla en Esperanto en la retejo de UEA sub ‘Revuoj’. Krome ĉe: https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000391446_epo…

## Jegorovas festas sian sepdekan

La 15-an de marto 2025 preskaŭ 40 esperantistoj renkontiĝis en restoracio sur la urbodoma placo de Kaŭno por festi la 70-an naskiĝdatrevenon de Povilas Jegorovas, elstara litova esperantisto kaj prezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Legu prian artikolon de Gražina Opulskienė en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/03/jegorovas-2/.

## Burunda esperantisto ricevis prezidentan premion

S-ino Anny Joanice Nizigiyimana, 26-jaraĝa burunda esperantistino, estis premiita de la Prezidento de la Respubliko Burundo, s-ro Evariste Ndayishimiye, dum la festado de la Internacia Virina Tago. Pro antaŭa sperto kiel partoprenanto de porjunularaj UN-eventoj ŝi estis elektita kune kun Mana Brinson (el Kongo DR) por reprezenti la Asocion en la Konferenco de la Civila Socio (UNCSC) de Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazis en majo 2024 en Najrobo, Kenjo, en kiu partoprenis pli ol 2 000 homoj. Ŝi post la evento fariĝis membro de la Subkomitato de Fakuloj de UNCSC kaj daŭre reprezentas la Asocion.

Ankoraŭ en 2024 ŝi partoprenis la 109-an Universalan Kongreson de Esperanto (UK), al kiu ŝi kontribuis pluraspekte, ĉefe pri temoj ligitaj al virina agado. Tio estis atendata, ĉar Joanice estas la vicprezidanto de la Asocio de Komercaj Virinoj de Burundo (AFAB) kaj direktoro kaj fondinto de la firmao Innovation Plus Plus. Grava parto de ŝia agado okazas por antaŭenigo de virina entreprenado. Ŝi dediĉas sin helpi aliajn virinojn venki la defiojn, kiuj malhelpas ilian ĉeeston en la komerca mondo. Joanice estas reprezentantino de Esperantista Virina Afrika Agado (EVAA) en Burundo kaj ŝi partoprenis la 2-an Afrikan Kongreson de Virinoj  en Aruŝo, ĝuste antaŭ la 109-a UK.

En intervjuo ŝi komentis, ke la ĉefa malfacilaĵo alfrontata de virinoj en Burundo estas la aliro al financado. “Ĉar ni ne havas garantiojn, ni ne povas peti bankan prunton. Aldone ekzistas socia antaŭjuĝo, kio signifas, ke virinoj ne estas kuraĝigataj entrepreni aferojn kiel ili devus, kaj tio baras junajn burundajn virinojn. Ni devas alkutimigi junulinojn fari esplorojn, trovi la informojn kaj la ŝancojn meti sin sur la merkaton, interretumi, iri al lokoj, kie ili renkontos aliajn junulinojn, kiuj jam okupiĝas pri entreprenado”, diris ŝi. Krom atestilon ŝi ricevis monpremion pro sia elstara laboro de la Prezidento de Burundo.

Koncizigo el gazetara komuniko de UEA

## Ĉinio – fervojista ĉampiono




En Ĉinio estis prezentataj prototipoj de grandrapidaj trajnoj kun rapideco de 450 km/h Du prototipojn de grandrapida trajnkompleto CR450 por maksimuma rapido 450 km/h, kaj trafikrapido 400 km/h oni prezentis en Pekino antaŭ testado, por optimumigi ilian konstruadon kaj por ebligi komencon de ilia uzado kiel eble plej rapide.

Fonto: Internacia Fervojisto 2025/1

## Dennis Keefe pri la Pasporto

Mi faris ĝis nun sep (el 15) virtualajn lecionojn de *Pasporto al la Tuta Mondo* per la tre profunda kaj detala kaj mirinde bona materialo verkita de Stefan MacGill (kelkcent paĝoj, kun respondoj kaj tekstoj). Mi substrekas LA EKZERCOJN, ĉar ĝis nun oni konas, kaj tion nur supraĵe, la 15 vidbendojn)

Tamen la lerno-valoro por mi, la kursgvidanto, estas alta. Mi uzas multe da tempo por prepari la lecionojn, kaj tio helpos min nun kaj speciale por venontaj jaroj, kiam mi re-proponos la kurson, kaj tiufoje mi vere varbos por havi pli da lernantoj.

Por la plejparto de la kursoj -- miaj aŭ de aliaj -- kiujn mi instruis dum mia vivo, mi bezonis minutojn por prepari. Por Pasporto, mi bezonas horojn. ŜAJNAS, ke la vidbendoj kaj la rakonto estas simplaj, sed malpli, se vi volas starigi demandojn (poste, ne realtempe) pri KIU faris KION KIAM kaj KIE. Mi daŭrigos la provadon ĉar la kurso Pasporto estas kompleta, profunda kurso tro neglektata -- speciale la paperaj ekzercoj.

Dennis Keefe.

## Novrozo – bela rozo

En la 22-a de marto komenciĝas la tradicia Novjaro de la landoj kaj popoloj laŭ la Silka Vojo en Eŭrazio. Nome de IKEF mi deziras al la koncernaj IKEF-anoj kaj la Silkvojaj popoloj feliĉan Novjaron! La Silka Vojo estas tradicie komerca vojo kunliganta Orienton kaj Okcidenton de Eŭrazio. Tra la Silka Vojo furoris diversaj lingvoj naciaj kiel komercaj brilaj sur la vastaj stepoj, altebenaĵoj, sablodezertoj kaj montaroj. Ĉu nia lingvo povos furori kiel komerca lingvo sur la Silka Vojo, kaj laŭ la Silka Vojo ĝi disvastiĝos tra Eŭrazio kaj la tuta mondo? Mi esperas ke koncernaj-landaj IKEF-anoj devas havi tiun ideon kaj penas kontribui al la bela ideo. Ni ĉiuj kune konstruu la novan Silkvojon per Esperanto por Esperanto kaj nia feliĉa vivo. Prosperon por via komerco, nia IKEF kaj Esperanto en la nova jaro kuranta al nia celo kun la bela rozo!

Prezidanto de IKEF, Ĉielismo WANG Tianyi, chielismo@qq.com

## La oferto de La Eo-Centro en Herzberg

**Aprilo 11-13** Esperanto-Semajnfina Kurso en la Esperanto-Centro
**Aprilo 25** Memorkunveno okaze de la mortotago de d-ro Zamenhof e la 14-a de aprilo ĉe la Z-monumento en Herzberg am Harz
**Aprilo 30** Ekskurso al Valpurga Festo, ekz. en la kuracparko de Bad Lauterberg
**Majo 11** Festo de la Interpopola Kompreniĝo
**Majo 23-25** Vizito el Pollando, kun virinoj el Góra.

**Junio 6-9** Pentekosta Kultursemajnfino en la Esperanto-Centro Herzberg
**Septembro 6** Internacia Tago de Arĥivoj; festado en la Eo-Centro

## Albana reprezentiĝo de junulara aranĝo

La 2-an de Marto, kadre de la tago de la denaska lingvo, reprezentante la Junularan Sekcion de Albana Esperanto Asocio, mi partoprenis en *Junuloj kaj Lingvoj 2025*, en kio kiu aranĝo mi faris prezentadon de la historio, vortaro kaj gramatiko de la albana lingvo. La prezentado enhavis priskribon de la albana lingvo kiel unika hindeŭropa lingvo, priskribon de la albanaj dialektoj, komparadon de la nova kaj la malnova albana, vortojn kaj frazojn en la albana lingvo kaj proverboj, sed ankaŭ parton de poemo verkita de Naim Frashërin nacia poeto el la 19-a jarcento. Oni faris plurajn demandojn pri la albana kulturo. Mi montris kantojn en la albana kaj tipan tradician albanan kapon: la "qeleshe-n".

## Onda demonstro

Aperis la demonstra versio de la decembra (vintra, laŭ la nordhemisfera vidpunkto) eldono de *La Ondo de Esperanto*. La 49-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava 140-paĝa 322a numero de *La Ondo*, publikigita antaŭ pli ol du monatoj.
Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/03/ondo-138/ elŝutu senpage la demoversion kaj (se vi ankoraŭ ne reabonis) pripensu vian (re)abonon.

========= vortoj: 985 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dek komunikoj el 2025 aperas, kune kun kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.